

AMO 64 – Fakaj Asocioj

la dua virtuala Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO)

Gastigata en Irano, mastrumata el Hungario.



Tiu sekva Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazos en la sekva sabato, la 9an de majo, ekde 14:00 laŭ la irana tempo. Jen la programo:

Centra Eŭropo	Irana Tempo	
11:30 -11:40	14:00 – 14:10	Malfermo (SMG – kun propono pri rekomendoj).
11.40 – 12.25	14:10 – 14:55	So Ĵin Su (estrarano de UEA): Koreio – ekzemplodona lando.
12.25 – 12.55	14:55 – 15:40	Ilona Koutny: Universitata instruado de esperantologio...
13.15 – 13.55	15:45 – 16:30	Amri Wandel (estrarano de UEA):
14.00 – 14.45	16:30 – 17:15	Małgosia Komarnicka: Pollando: Regionaj asocioj pandemie
14.45- 15.30	17:15 – 18:00	Forumo: UMEA, ILEI, kaj pliaj Fakaj Asocioj. Gvidos SMG.

AMO 64: Fakaj Asocioj (FA) – ses rekomendoj al UEA

La proponataj rekomendoj estas direktitaj al la Estraro kaj eventuale iliaj komisiitoj. Ili ne estas direktitaj al la Centra Oficejo.

La rekomendoj estu traktitaj en la Forumo fine de AMO 64.

1 UEA petu aŭ postulu de ĉiu Aliĝinta FA kaj ĉiu FA ligita per kunlabora kontrakto livero de almenaŭ kvar kontaktadresoj (nomo, lando, retadreso kaj se konata uea-kodo), kaze ke paneu la oficiala retadreso.

KOMENTO: Tio defendos nin kontraŭ la kontinua kaj kreskanta nombro de paneintaj retadresoj (inter 15% kaj 20%). Detektivi alternativajn adresoj forkonsumas multegajn horojn por kiu UEA ne havas rimedojn.

2 UEA aktive kuraĝigu al Fakaj Asocioj kunlabori kun aliaj Fakaj aŭ Landaj Asocioj, eventuale per la faciligoj de la serio da Seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO), retejoj aŭ forumoj.

KOMENTO: Ekzistas naturaj kampoj por kunlaboro, precipe en la nuna tempo.

3 UEA starigu minimumajn postulojn por Kunlaborantaj Fakaj Asocioj, prefere en sia propra regularo ol en la unuopaj kontraktoj. La devoj de Aliĝintaj Fakaj Asocioj estu larĝigitaj, ne nur por raportigi la membronombron, sed ankaŭ sian agadon.

KOMENTO: Tiuj modestaj postuloj estu konataj kaj respektataj.

4 La kontraktoj pri kunlaboro estu vidigataj en retejo de UEA. Se mankas iuj kontraktoj, la koncerna estrarano de UEA proponu al la FA novan kontrakton, kiu enhavu minimumajn devojn por la FA. Ekzistu modelo por konvena norma kontrakto.

KOMENTO: Same kiel Statutoj de aliĝintaj LA, ni rajtas timi, ke pluraj kontraktoj ne plu estas troveblaj.

5 UEA sendu ĉiujare al ĉiuj FA demandilon pri sia agado, aŭ resumon pri la agado de la antaŭa jaro por ricevi ĝisdatigojn. Ĝi aperigu resuman raporton, simile ĉiujare. La unua demandilo eliru ene de 2020.

KOMENTO: La demandiloj ne devas esti ampleksaj. Valoregus ricevi agadresumon de 200-300-vorta. UEA ne havas rimedojn trakti longegajn tekstojn.

6 UEA starigu plenan retan liston de la nuntempe aktivaj Fakaj Asocioj: Aliĝintaj, Kunlaboraj kaj sendependaj. La nereagintaj FA aperu en aparta sekcio fine de la prezento.

KOMENTO: La enhavo de la siatempa Jarlibro nepre devas pluvivi rilate la FA.

